The attention of all affiliated groups is called to By-law No. 3, and all such groups are hereby reminded that in accordance with the rules they have to make their arrangements for the election of their Delegate Councillors for the year 1915-16, and to notify the names and addresses of the persons so elected to the Secretary of the Association *not later than December 21, 1914*. In the absence of such notification it will be assumed that a group is not desirous of changing its representative. Each affiliated group is entitled to nominate one Delegate Councillor. If the number of group members is fifty, then two Delegate Councillors may be appointed, and so on in the proportion of one Delegate Councillor to each twenty-five members. Such Delegate Councillors must be corporate members of the Association.

Those societies which have not yet paid their affiliation fees for the current financial year are requested to make a remittance without delay, in order to facilitate the closing of the accounts at December 31 next.

H. CLEGG, *Secretary*.



Pri iu Sapo.

Kava Sinjoro.—Mi aĉetis prove skatolon da "Espero" sapo, kaj tiel mi ŝatis ĝin, ke mi skribas por ĝin rekomendi al la legantoj de la "B.E." kiuj ankoraŭ ne havis la feliĉon ĝin provi. La sapo estas tre milda kaj bonodora kaj facile ŝaŭmiĝas. Kiel la plej bonaj tualetaj sapoj, ĝi estas farita el vegetaj oleoj, ne el besta graso. Se nur mi estus poeto, mi skribus poemon pri ĝia subtila ĉarmo kaj mola delikateco. Eĉ kiel estas, nur la timo, ke mi poste ne kuraĝus transpaŝi la sojlon de via sanktejo, Via Ĉefredaktora Moŝto, min detenas de la provo. Mi do pensas, ke estus singarde resti en la sfero de prozo, kaj simple rekomendi la poezi-inspirantan sapon "Espero" al la samideanaro.

N.B.—Skatolo da "Espero" sapo estus ŝatata kiel parto de Kristnaska donaco. *Mendu ĉe B.E.A.*

NORÉMAC.



Libraro kaj Gazetaro.

Travivaĵoj de Ro Ŝo.—Originale verkita de Richard Sharpe, F.B.E.A., el Torquay. *Vendata por la profito de Esperanto ĉe la Blinduloj*. DUA ELDONO, KOREKTITA KAJ PLIGRANDIGITA. Prezo 1ŝ. 8p. afrankite. La unua afero, kiu frapas nin ja la ekvido de ĉi tiu nova eldono de la interesa kaj tre ŝatata verko de nia amiko Ro Ŝo, estas la tute alia bildo sur la kovrilo, kiun la verkinto klarigas sur pĝ. 3 per nova paragrafo. La kvin lastaj paĝoj estos novaj kaj enhavas malgrandan liston de korektoj, saĝajn konsilojn kaj rekomendajn, dankojn al la diversaj helpintoj kaj (bedaŭrinde) la adiaŭojn de la aŭtoro. Ni esperas, ke la nova eldono ricevos eĉ pli bonan akcepton ol la unua, kaj tiel denove profitigos al la propagando de Esperanto inter la olinduloj. Ni varme rekomendas la libron al ĉiu Esperantisto, ĉu lernanto aŭ spertulo, certaj ke li ne nur ricevos multe da plezuro el ĝia tralegado, sed ankaŭ, pro la bonegeco de ĝia stilo, pliboniĝon de sia scio de la lingvo.

La Vivo kaj Oraj Reguloj por la Bonsano, de Charles A. Christianson, esperantigis James Robbie kaj Alexander M'Callum. En tiu ĉi ok-paĝa broŝureto ni ricevas kernecajn dirojn de famaj aŭtoroj, fanditajn en versajon esperantan, ankaŭ dek tri regulojn por la bonsano, kiuj nepre utilos al ĉiu, kiu ilin sekvos. Tamen pri unu el tiuj ĉi mi dubas, ĉu ĝia graveco meritas lokon.—A.E.W.

Du Premiitaj Tezoj.—Jen 20-paĝa broŝuro enhavanta la tezojn, kiuj gajnis al la verkintoj, en 1913 kaj 1914 respektive, la Prezidantan Premion, kiun starigis siakoste nia Prezidanto de la B.E.A., S-ro Leŭtenanto H. B. Mudie. Ambaŭ tezoj estas tre legindaj por ĉiuj Esperantistoj, kiel ankaŭ por ne-Esperantistoj, kiuj interesigis je la objektoj traktitaj. En la tezo: *La grava signifo de l' Nova Testamento en Esperanto*, Pastro A. J. Edmonds, M.A., kies bedaŭrinda morton ni raportis en nia numero de lasta Julio, traktas la Novan Testamenton laŭ ĝiaj vidpunktoj literatura kaj morala, ankaŭ konsideras ĝin kiel instruilon kaj propagandilon por la Esperanta movado. Mi devas, kiel honesta kritikanto, raporti, ke kelkaj (tre malmultaj) radikoj estas neĝuste uzitaj, ekzemple en la diro, ke Jesuo "riverencis la virinojn," kie oni volis komprenigi *respektigis*. Bonegan pledon faras S-ro W. Phillimore en sia tezo: *La graveco de Esperanto por la Blinduloj*, montrante, kiajn gravajn servojn jam faris, kaj ankoraŭ plimulte faros, Esperanto por tiuj niaj fratoj, kiuj ne ĝuas la benon de la vidado. Kompreneble li parolas pri la fizike blindaj; sed li povus dediĉi ankaŭ kelkaju vortojn pri spirite blindaj, por kiuj Esperanto nepre servos kiel grava lumigilo.—A.E.W.

La Venecia Komercisto.—Frue en Decembro aperos la longe atendita verko, kiun nia kolego, S-ro A. E. Wackrill, nun kondukas tra la preso: nome, lia traduko de la glora dramo de William Shakespeare, "The Merchant of Venice." Recenzi ian verkon antaŭ ĝia apero ni ne kutimas; tamen, ĉar ni vidis la manuskripton, ni povas ĝin varme rekomendi al niaj legantoj. La B.E.A. eldonas ĝin po 75 spesdekoj (1ŝ. 6p.) en papera kovrilo, aŭ Sm. 1'000 (2ŝ. op.) tole bindita. Ĝi tre taŭgos, kiel Kristnaska donaco.

L'Anglais Usuel sans professeur en 15 jours kaj Het Engelsch voor het dagelijksch verkeer in 15 lessen zonder meester, verkitaj de nia malnova kaj konata samideano, A. J. WITTEKOP, el Bruges, prezidanto de la Belga Esperantista Ligo, estas du 64-paĝaj libretoj, kiuj sendube tre utilos al niaj gastoj, la kompatindaj rifuĝintoj en Anglujo. Ni tre varme rekomendas la librojn al ĉiu, kiu havas la honoron gastigi anon de la brava belga nacio, dezirantan profiti sian restadon ĉi tie, akirante la anglan lingvon. Ĉiu libreto kostas 6p. aŭ 6½p. afranke ĉe Simpkin Marshall, Hamilton, Kent & Co., aŭ B.E.A.

Alilandaj Gazetoj.—Dum la monato Novembro ni ricevis la sekvantajn: *La Holanda Pioniro* (du numerojn Aŭgusto ĝis Novembro); *Ondo de Esperanto*, el Rusujo (Oktoebro); *Esperanto Monthly* (Women's Number), Novembro 15; *Scienca Gazeto* (Aŭgusto, Septembro), el Francujo; *Norvega Esperantist* (Septembro); *La Espero* (Oktoebro), el Svedujo; *Amerika Esperantisto*, du numeroj, Julio, Aŭgusto, Septembro; *Vegetarano* (Septembro—Novembro), el Milano, Italujo; *Germana Esperantisto* (Aŭgusto—Septembro. A. Eldono), per amiko el Italujo; *La Voĉo de la Popolo* (11 Julio) el Hinujo.

Vendotaj: Vere nigra Katidino, Persa (Reĝina), ses monata, bela felo, orkoloraj okuloj—naskinto "Rubenstein," premiita en Crystal Palace, 1912 kaj 1913, longa registrita gepatraro, prezo, 15ŝ., Sm. 7½; ankaŭ nigra virkafido, kvarmonata, sama naskinto, prezo 10ŝ. 6p., Sm. 5'250. Sin turni al F.M. ĉe B.E.A., 17, Hart-street, W.C.

Redakcia Korespondado.

S-ro Bernard E. Long deziras atentigi la samideanojn al la antaŭ nelonge fondita LIGO DE INTERPRETISTOJ, kiun li ĵus aliĝis, kaj kiu dissendis inter la francaj kaj belgaj rifugiintoj la sekvantan avizon verkitan en la franca kaj flandra lingvoj. La komitato de la Ligo faras alvokon al ĉiuj, kiuj scias unu aŭ ambaŭ suprenomitajn lingvojn, ke ili fariĝu laŭvolaj interpretistoj kaj portu la insignon (blanka butono kun ruĝa borderaĵo kaj la devizo "Ligne des Interprètes, No...." aŭ "Vertalers bond No..."), kiun oni povas ricevi senpage turnante sin al Hon. Secretary, The League of Interpreters, *City Central Hotel, Newgate-street, E.C.*

S-ro Long diras "La Ligo estos sub la aŭspicioj de la Lord-Urbestro, kaj evidente bone aranĝita. Ju pli la Esperantistoj aliĝos des pli bone, ĉar ni povos trovi kelkfoje okazojn por propagando inter tiuj malfeliĉaj alilingvanoj!"

AVIS AUX RÉFUGIÉS.

LIGUE DES INTERPRÈTES.

SOUS LE PATRONAGE DU LORD MAIRE DE LONDRES.

Une Ligue d'Interprètes a été formée, pour aider les Français et les Belges qui pourraient avoir besoin de renseignements durant leurs déplacements dans Londres.

Quiconque se trouve dans ce cas peut s'adresser aux personnes rencontrées avec l'insigne, dont dessin ci-dessous.

Ces personnes ont pris l'engagement volontaire de remplir l'office d'Interprètes et elles s'empresseront, en quelque temps ou lieu que ce soit, d'aider ceux dans l'embarras, ceci dans la mesure que leurs affaires le leur permettent.



BERICHT AAN VLUCHTELINGEN.

VERTALERSBOND.

Een vertalersbond is tot stand gekomen, voor doel hebbende: de Belgen en Franschen te helpen, welke zich onder weg in Londen in moeilykheden bevinden, op straat of elders.

Zy die den weg niet weten te vinden, of inlichtingen wenschen te bekomen, kunnen die bekomen door het opzoeken van degenen die het hierbovenstaande insigne dragen.

Zulke personen handelen als vrywillige vertalers en zyn bereid ten allen tyde de noodige inlichtingen aan vluchtelingen te geven welke hun hulpzaam kunnen zyn; voor zoover tyd en gelegenheid hun dit toelaat.

Classes for Soldiers.

We would like to draw special attention to the following letter from our energetic *sami-deanino*, Miss Blake. We hope that her example will be followed all over the country where there are soldiers' camps, and that also an effort be made, as soon as Government permission be obtained, to distribute Keys, Text-books and other *propagandiloj* among the prisoners in the various camps.

37, STAVERTON-ROAD, WILLESDEN GREEN, N.W.

DEAR SIR,—When the war broke out I looked about like most of us to see in what way I could be of service to my country. From some I heard: "Oh! Esperanto must now lie low for a bit," but to this I could not assent, although I endorse fully the opinion that at all times if propaganda work is to succeed it must be carried out with discretion as to time, place, and person. But it seemed to me that if I knew of something which I considered to be of practical utility and value, it was that very thing that should be offered for the service of the country. Esperanto was such a thing, and I write now to inform you of a way in which I think this service can be rendered, and at the same time good propaganda work carried out easily and with good results by *gesamideanoj* throughout the country.

It has been pointed out by the Government how advantageous it would be if classes on various subjects could be arranged for the soldiers in the numerous camps, and thus help them to spend the long winter evenings with interest and profit to themselves.

I endeavoured to act on this suggestion, and now send you the result of my experience, in the hope that it may help others who feel inclined to carry out this recommendation of the Government.

I called at one of the recreation rooms carried on by the Y.M.C.A., who have, I believe, the sole permission of the War Office to organise such places, and mentioned to the superintendent, in course of conversation on another subject, that I could arrange for a class for Esperanto if any soldiers expressed themselves willing to be instructed. This suggestion was welcomed by him, and I was allowed to put up a notice to this effect. On calling a few days later I found one name had been given in. I invited the inquirer to visit my class in the district; he did so, and told me he had been going round among his fellows, and that about eight or nine wished to learn.

I have now given two lessons in their own recreation rooms, and hope to continue the class as long as the soldiers remain in the district.

Now all this has come about without any propaganda work at all, so I think that if a popular lecture, with lantern slides and music, were to be given at the different camps, to be followed by a course of lessons, many would take up the subject and, as we Esperantists know so well, would find in it a pleasure and use of which now they have no notion. I may say I have been surprised at the quickness with which the men have followed my instruction. Of course I endeavour to make them speak at once, and later on hope to help them by Esperanto conversation to learn some of the rudiments of Red Cross work. I should like to mention that I was told before I put up the notice *re* Esperanto that French lessons had been offered previously, but that no response had been made.

Esperante, ke tiu ĉi mia sperto kuraĝigos la aliajn,
Mi restas, Fidele la via,

M. L. BLAKE.

Alilandaj Sciigoj,

Nederlando.—Post kelkmonata paŭzo mi ĝojas ree povi ion raporti pri la Esperantomovado tie ĉi, kiu ankaŭ sentas kontraŭaĵojn de la ĉie furiozanta fato. *La Holanda Pioniro*, kies redaktoro estis "mobilizita," denove aperis; diversaj grupoj regule kunvenas kaj rekomencis la propagandon malgraŭ kaj eĉ pro la malfavoraj cirkonstancoj. En Hago ia propagando estis farata de nia fervora samideano, F-ino N. Boon, per dissendo de cirkuleroj montrantaj la utilon de helplingvo ĉe la Ruĝa Kruco. Ŝi ankaŭ komencis Esp. kurson por mobilizitaj soldatoj. Neatenditan okazon por propagandi havis la Hagaj Esperantistoj jenmaniere: Survoje al London, por tie koncertadi, la ekmlito surprizis gesamideanojn, Václav Klicka, harpvirtuozo, kaj Martha Lénarde-Schroedl, koncertkantistino, ambaŭ el Prago. Ili "albordigis" en Hago kaj dank' al Esperanto sentas sin tie kvazaŭ hejme. La samideanoj ebligis al ili doni koncerton (ĉeestita ankaŭ de ne-Esperantistoj) je propra profito, kaj kiu havis tian sukceson, ke ĝi jam estas sekvita de alia en unu el la pli grandaj Hagaj koncertsalonoj. Jen kion diras pri ili la kritikoj:

"Al la milito ni dankas almenaŭ unu agrablan surprizon. Ni estis la gastoj de la Haga Esperantista Propaganda Komitato kaj havis la ĝuon aŭskulti harpvirtuozon Klicka, kiu jam akiris brilajn sukcesojn en Prago, Vieno, Berlino, Leipzig, Hamburg, London, k. t. p., kaj kantistinon, Martha Lénarde-Schroedl. Multe da eminentaj harpistoĵoj ni jam havis en Hago, sed artiston kiel Klicka ni ankoraŭ ne aŭdis. El sia Erard-harpo ĉi tiu ĉeĥo sorĉe eligas sonoraĵojn de mirinda belegeco kaj eksterordinare riĉa kaj varia sonkoloro. Ĉio, kion ni aŭdis de ĉi tiu virtuozo atestis pri brile teknika kaj muzika majstreco. La kantistino disponas pri afablaj, tre simpatiaj rimedoj, ŝi estas artistino kun plena mezzo-nuanca tono, forta kaj sonora, kaj havanta muzikan kaj poentan senton."

Ne mirinde estas, ke post tia sukceso kaj ĉiuj afablaĵoj per Esperanto ricevitaĵ, nia samideano fariĝis "terura" Esperantisto, kiel li mem karakterize deklaris. Li esperas trovi en aliaj landoj, kien li intencas poste fari artistajn vojaĝojn, samideanojn tiel servemajn kiel la Nederlandaj. Vi, legantoj de B.E. notu en via memoro la nomojn de ĉi tiuj ĉeĥoj, por ne preterlasi okazon aŭdi eminentajn artistojn, helpi fervorajn Esperantistojn!

Responde al cirkuleroj dissenditaj de la

estraro de nia nederlanda federacio "La Estonto estas Nia" la kasisto jam ricevis preskaŭ 200 sm.* por la kompatindaj belgaj rifugiĵoj. Ĉiuj ĝisnunaj donacintoj estas britoj. Al ili nian varman dankon je la nomo de tiuj malfeliĉuloj.

Y.Z.



Donacoj por la Helpe de la Belgaj Rifugiĵoj en Holando.

Per la Nederlanda Federacio Esperantista.

(*Vidu N-on de Novembro, pĝ. 206.*)

Redakcio de B.E.....	£1	0	0
S-ino N. F. Smith, Bexhill	5	0	0
S-ro W. J. Pratt, Grange-over-Sands	1	0	0
F-ino Skeen, Sunbury	0	2	6
S-ro J. L. Brook, Huddersfield	0	5	0
" T. J. Gueritte, Surbiton	1	0	0
" M. C. Butler kaj liaj kursanoj	1	12	9
" Bertram Chatterton, London	1	0	0
" L. H. Leadley, York	1	0	0
" C. A. Fairman, London	0	5	0
" H. Clegg, London	0	5	0

£12 10 3

Pluajn monsumojn oni danke ricevos.



Belgaj Esperantistoj en Britujo.

Sajnas, ke listo de belgaj Esperantistoj, nuntempe loĝantaj en Britujo, estus utila por propagando kaj reciproka servo.

La B.E.A. do, aranĝas kompili tian adresaron, kaj ni petas, ke la legantoj sciigu nin pri la nomoj kaj adresoj de tiaj belgaj samideanoj. Niaj grupoj estas ankaŭ petataj kunlabori en tiu afero.



Sur la Batalkampoj.

"Adiaŭ, filo kaj amato!
De nia land' kaj reĝ' soldato!
Vin benu Di', kaj mi vin benas.
Ne pensu pri estonta gloro;
Hodiaŭ estas devohoro;
Neniam morgaŭ venas."

Kun glor' finiĝas la batalo;
Sed sur la kampo de fatalo
Mortint' skribaĵon tenas;
"Patrin', ĝis mia lasta horo
Memoras vin amanta koro;
Neniam morgaŭ venas."

Originala versaĵo de C. BICKNELL.

* Krom tio, vidu malsupre liston de donacoj bonkore senditaj de niaj legantoj per nia gazeto.

Maldormado en Milithospitalo,

Oktobro, 1914.

La ĉambrego estas iu lerneĉambro de la knaba liceo, en kiu oni starigis la milithospitalon. Ĉe la loko de la skribtabloj oni vidigis la litojn, mallarĝaj litoj el fero, ĉiuj samaj, kun blankaj litkovriloj.

Tute noktiĝis, ĉiuj tagaj bruoj mallaŭtiĝis, ĉie regas silento nur, de tempo al tempo, interrompata de rapida, malpeza marŝado de ia flegistino, kiu transiras antaŭ la pordo, paŝante sur la teraso. Tra la silento senĉese aŭdiĝas la ĝemado de la vunditoj, kiuj, eĉ dormante, plendas; subite, pli laŭta dolorkrio, kaj denove la senĉesa, unuona ĝemado. Ĉi tie daŭriĝas la ofereco de la batalkampoj. Ho la milito! Kiel kelkaj homoj povis alpreni sur sin la timindan respondecon komenci la militon? Necese ili estas krimuloj aŭ frenezuloj.

En la ĉambrego oni kiel eble plej malbriligis la gaslumon kaj, por ke ĝi estu ankoraŭ pli malhela, dika verda vualo elpendas de la lumŝirmilo, zorge ĉirkaŭante ĝin. Malklare oni videtas sur la blankaj litkusenoj la palajn vizaĝojn, streĉitajn de la sufero; kiam, pro febrovarmece, la vunditoj forflankas la litkovrilojn, ili vidigas stumpojn envolvitajn per sangmakulitaj tukoj, fortranĉitajn brakojn aŭ senigitajn je manoj, kriplitajn piedojn, krurojn en bandaĵoj. Tiu senforma pako de tolaĵo estas kapo, kies vizaĝo estas nun sola grandega vundo. Ĉi tiu, rapide spiranta, havas pulmon trafitan de kugleto, nun li agonias. Tiu alia deliras, li kredas ke li estas sur la batalkampoj, aŭ li kantas hejmvilaĝan kanton, kaj tio eligas larmojn. Sur la unua lito de la maldekstra vicado iu suferulo estas turmentata de la kruelegaj doloroj de la tetano; neniam mi forgesos la kuntiritajn trajtojn de tiu plumbeviola vizaĝo kaj tiujn angorajn okulojn ŝajnantajn diri: "Mi estas jam kaptaĵo de la morto, sed savu min, mi havas kvar infanetojn," dum la lipoj ankoraŭ provas rideti—ĉagreniga rideto!

Kaj ĉe la lumeto de la vualita gaslampo, en la nokta silento, la bildo de tiuj ĝemantaj vunditoj havas ion solenan, imponan, samtempe malĝojegan kaj grandiozan, kiel tiuj teruraj, nekompreneblaj fenomenoj, kies kaŭzoj estas nekonataj, kaj antaŭ kiuj la homoj haltas, dolorpremitaj, miregitaĵoj, ne komprenante. Tio estas bela kiel antikva ofero, ĝi ne plu estas nur la sufero turmentanta la homaron, ĝi estas la sinofero pro la amo al tiu superbela abstraktaĵo: la Patrolando.

De la milithospitala ĉambrego mia penso

forflugas al la batalkampoj; mi vidas la mortintojn, ĉiuj junaj, fortoplennaj, esperoplennaj nun senmovaj, malvivaj, por ĉiam silentaj; mi vidas la vunditojn petantaj helpon, kompaton, antaŭ nur kelke da minutoj sanoplennaj, nun malfortigitaj, disbatitaj; mi pensas pri la jeno, raportita al mi de iu vidinto; sur kampoj je betoj, la malamikoj, mortintoj kaj mortantoj, estis tiel multnombraj, ke ili altuŝis unu la alian, de tempo al tempo ia brako svingiĝis, ia kapo moviĝetis, raŭka krio laŭtiĝis, nekalkulebla nombro de korpoj torĉiĝis, kvazaŭ daŭra konvulsio trakuris la tutan kampon, ŝajnis ke tio estis la tero, kiu streĉiĝis. Ho la kruelega svarmado je konvulzitaj korpoj! Mi vidas lagojn de sango, ebenaĵojn kovritajn per kadavroj, minace starigantaj; la tero krevas, fantomoj eligas, ankaŭ ili malbenas la kulpulojn kaj krias: venĝon; amikoj kaj malamikoj kuniĝas por malbeni tiujn, kiuj volis tiom da krimoj. Kaj ĉie amasetoj da tero, kiuj portas krudan krucon faritan el du kunligitaj tranĉetoj kaj surhavantaj ruĝan aŭ bluan kepon, malheligitajn de la malseka vetero, kvazaŭ la aŭtunaj floroj, kiuj sentis la froston.

La ĝemoj de la vunditoj alvenas al miaj oreloj, miksiĝas kun la ĝemoj de la vunditoj, apud kiuj mi maldormas; oni ne bandaĝis tiujn de la batalkampoj, sur ilin falas pluvo, al ili estas malvarmege, la morto travagas, la ŝlimo kovras ilin, enterigas ilin vivaj. Ho la milito, la milito! Ĉu tiuj, kiuj volis ĝin ankoraŭ povas dormi? Oni mortpunas homon, kiu mortigis alian homon, kion oni devus fari al homoj, kiuj volis militon, ĉar sur ilia konscienco pezas la kulpo pri centoj kaj centoj da miloj da mortigoj? Ĉu estas pli abomenindaj krimuloj? Mi volus vidi ilin, kun la manoj enkatigitaj, ĉe la malgloriga loko de la kulpigatoj en juĝejo kaj por ĉiam kondamnataj je la laborpunoj.

Oni ne diru, ke la milito havas leĝojn, ke estas kavalira maniero fari militon. La milito ne povas havi leĝojn, ĉar ĝi estas ekster la leĝojn. Se ĝi havas leĝojn, kiuj pravigas ĝin, oni ne plu rajtas malliberigi la malbonfarantojn, ankaŭ ili agas laŭ siaj leĝoj, kiam ili ŝtelas, rabas, bruligas, mortigas; ankaŭ la sovaĝaj bestoj agas laŭ sia leĝo. Se la milito estas permesata laŭ specialaj leĝoj, ĉiuj krimoj estas permesataj, ĉar ĉiu krimulo agas laŭ ia leĝo, ĉefe oni ne devas kontraŭstari al la sovaĝaj bestoj, kiuj agas laŭ la leĝo de sia naturo. Ĉu la homoj, kiuj komencas militon, ne estas kiel krimuloj kaj sovaĝaj bestoj, aŭ ĉu estas malpermesata mortigi sed permesata mortigadi? Komenci militon! tiom grandega.

krimo, ke la respondeco de ĝiaj aŭtoroj superas la homaron; pri ĝi ili povos respondi nur al Dio.

La milito, estante krime mem, entenas ĉiujn krimojn; ĝi bruligas la vilaĝojn, detruas la urbojn, bombardas la katedralojn, mortigas la homojn. Bombardi la katedralojn, mortigi la homojn, egalvaloraj krimoj, ĉar ambaŭ estas temploj de Dio. Ambaŭ havas animon; la katedraloj entenas la animon de Franclando, la animon de la raso, faritan de ĉiuj generacioj kiuj pasis, kaj bombardi la katedralojn estas montri, ke oni celas detruigi la francan animon, sed ili defendis ĝin, tiuj vunditoj ĉi tie ĝemantaj; ili defendis ĝin, tiuj nun por ĉiam dormantaj sur la kampoj de Franclando; ĝis la fino ili defendos ĝin tiuj, kiujn la morto indulgos. La sinofero de l' unuj, la malavaraj penadoj de l' aliaj savos ĝin kaj konservos ĝin netuŝita, ankoraŭ pli nobla, pli pura, en la patriota amo, kiu vekigis varmega en ĉiuj francaj koroj. Dormu suferuloj, sur viaj mallargaj litoj; dormu pace, mortintoj, sub la rigardo de la ĉielo, vi, filoj de la patrolando kaj vi, bravaj amikoj, fratoj en la penado, vi, ne devigataj batali, bonvole, heroe alkurintaj por helpi al ni. Honto al tiuj, kiuj volis la militon, sed gloro al tiuj, kiuj defendis la atakitan patrolandon, al tiuj, kiuj sindoneme elstariĝis por defendi la rajton... Franclando ne forgesos, kaj super vi jam brilegas la eterna lumklareco!

MARTA HENRIET-NOLOTTE, E.L.A., *Dijon*
(*Franclando*).



Al Lukasta, de iu foriranta al la Milito.

(To Lucasta, going to the Wars).

Colonel Lovelace, 1618—1658.

Ne nomu min senama, kara,
Ĉar el la pacsanktejo
De viaj brust' kaj mens' mi flugas
Nun al la militejo.

Mi, vere, novan amatinon,
Nun sekvas, bataladon;
Kaj, pli fidplene, mi favoras
Ĉevalon, ŝildon, spadon.

Vi, tamen, ŝanĝiĝecon tian
Adoros ankaŭ iom;
Se mi honoron ne pli amus,
Mi vin ne amus tiom.

Tradukis C. BICKNELL.

La Bela Songo.

Jen tondras paflegoj
Vidvin-kaj orf-igante,
Plore gas forĉasitoj
El hejm' kaj land' migrante.

Ŝiparo enfondiĝas,
Dronigas la maristojn,
Pafilc'j, bajonetoj
Forbuĉas militistojn.

Ĉu songo nia tio
Pri dolĉa ekfratiĝo
Tutmonda de l' homaro?
Ho! kia elreviĝo!

Inkubo nin ekpemis
Pri raba minotaŭro,
Vekiĝu ni do fine—
Jam longa ĝia daŭro!

Restontaj ni reĝu
Nur "pacaj batalantoj"
Por ĉiam forigante
Mortigon de falantoj.

Ho, stelo, ama stelo,
Vi, kiu senlumiĝis,
Sur paca mond' rebrilu,
Per pento ĝi puriĝis.

Ni ree reciproke
Amhelpos la frataron,
De l' sama Patro filoj
Ni serĉu nur homaron.

Nek ras' de hom', nek lia
Vizaĝa la koloro
Forigu nian senton
De l' devo de honoro.

La muroj detruitaj
Nun inter la popoloj
Eniron nur ebligu
Per helpo al la koroj.

Sufiĉe jam da sango
Sur Di-kreita tero,
Sekiĝu patrin-larmoj
Pri fila malapero.

El semo tiel nobla
La mondo pac-riĉiĝos,
Kaj: "La bela songo de l' homaro
"Por eterna ben' efektiviĝos!"

ROSA JUNCK.

Oktobro 26—27, 1914.

La Ŝtelita Letero.

"The Purloined Letter," de E. A. POE; el la angla tradukis A.E.W.

Nil sapientiæ odiosius acumina nimio.—Seneca.

En Parizo, tuj post la krepusko de unu ventobata vespero en la aŭtuno de 18—, mi estis ĝuanta la duoblan lukson de meditado kaj pipo "marŝaŭma" kunule kun mia amiko, C. Auguste Dupin, en lia biblioteketo aŭ libro-kabineto, *au troisième, N-ro 33, Rue Dunôt, Faubourg St. Germain*. Almenaŭ dum unu horo ni tute silentis, ambaŭ ŝajne, se okaze iu nin rigardus, atente kaj sole okupataj kun la turniĝantaj kirloj de la fumo, kiu pezis la aeron de la ĉambro. Miaflanke, tamen, mi cerbe konsideradis certajn temojn, kiujn pli frue en la vespero ni estis priparolintaj; mi aludas pri la afero de la *Rue Morgue* kaj la mistero, kiu ĉirkaŭvolvis la mortigaĉon de Marie Rogêt. Mi do kalkulis ĝin okazaĵo iom rimarkinda, kiam, larĝejetmalfermintelapordon, eniris en nian ĉambron nia malnova konato, Monsieur G—, Prefekto de la Pariza polico.

Kore ni bonvenigis lin, ĉar estis en tiu homo eco amuza preskaŭ duone egala al lia kvalito neestiminda, kaj jam dum kelkaj jaroj ni ne renkontis lin. Ĝis nun ni sidis en la mallumo; Dupin ekstaris por eklumiĝi lampon, sed residiĝis ne farinte tion, tuj kiam G— diris, ke li venis por konsiliĝi kun ni, aŭ, pliĝuste, por peti pri la opinio de mia amiko, pri ia oficiala afero, kiu jam kaŭzis multe da klopodado.

— Se temas pri io bezonanta enpenŝiĝon,— diris Dupin, sin detenante de la ekbruligo de la meĉo,— ni pli taŭge ĝin esploros en la mallumo.

— Jen alia el viaj strangaj ideoj,— diris la Prefekto, kiu kutime nomadis "stranga" ĉion ekster la limo de sia kompreno, kaj tiel vivis meze de vera legiono da "strangaĵoj."

— Tre ĝuste,— diris Dupin, kaj li proponis al sia vizitanto pipon kaj rulŝovis al li komfortan brakseĝon.

— Kia do embaraso nun estas? — mi demandis. — Jam nenio el la speco mortigaĉa, espereble?

— Ho, ne! nenio tia. Efektive la afero estas eksterordinare simpla, kaj sen ia dubo ni povos mem sufiĉe bone ĝin prizorgi; sed al mi ŝajnis, ke Dupin eble volos aŭskulti ĝiajn detalojn, ĉar ĝi estas tiel ekstreme *stranga*.

— Simpla, tamen stranga,— diris Dupin.

— Nu, jes; sed ne tute ĝuste. Efektive ni ĉiuj sentis multe da embaraso pro tio, ke ĝi estas tiel simpla kaj tamen nin tute spitas.

— Eble vin erarigas la simpleco mem de l' afero,— diris mia amiko.

— Kian sensencaĵon vi parolas! — respondis la Prefekto, kun ridego.

— Eble la mistero estas iom *tro* facila,— diris Dupin.

— Benon de ĉielo! kia neaŭdita ideo!

— Iomete tro mem-evidenta.

— Ha! ha! ha! ha! ha! ha! ho! ho! ho! — laŭte ridegis nia vizitanto, treege tiklite,— Ho, Dupin! iam vi ĝismorte min tiklos!

— Kaj kia efektive estas la koncerno? — mi demandis.

— Nu, mi al vi diros,— respondis la Prefekto, kaj li eligis fumon per longa, kvieta, pensema blovo, sin alĝustigante en sia brakseĝo.— Per malmultaj vortoj mi vin diros; sed, antaŭ ol mi komencos, mi avertu vin, ke ĉi tiu afero postulas la plej grandan sekretecon, kaj mi tre verŝajne perdus mian nunan situacion, se oni sciis, ke mi al kiu ajn estas ĝin konfidinta.

— Komencu,— mi diris.

— Aŭ ne,— diris Dupin.

— Aŭdu, do. Oni informis min persone, el tre alta loko, ke certa dokumento, ekstreme grava, estas ŝtele subforigita el reĝa apartamento. La homo, kiu ĝin ŝtelis, estas eksterdube konata; oni vidis lin forpreni ĝin. Estas sciata, ankaŭ, ke ĝi ankoraŭ restas en lia posedo.

— Kiel oni tion scias? — demandis Dupin.

— Tio estas klare konkludita laŭ la naturo de la dokumento, kaj laŭ tio, ke ne aperis ankoraŭ certaj rezultatoj nepre tuj montriĝontaj, se ĝi elirus de la posedado de l' ŝtelinto, alivorte, se li uzus ĝin, kiel li certe intencas fine ĝin uzi.

— Iom pli definitive parolu,— mi diris.

— Nu, mi povas ĝis tio riski dirante, ke la papero donas al sia havanto certan influon en certa direkto, kie tia influo estas senmezure havinda.— Alla Prefekto tre plaĉis la frazumado diplomatieca.

— Ankoraŭ mi ne tute bone komprenas,— diris Dupin.

— Ĉu ne? Nu, la malkaŝo de la dokumento al iu tria persono, kies nomon mi nepre ne eldiros, implikis en dubon la honoron de iu treege altranga persono; kaj tiu ĉi fakto havigas al la tenanto de la dokumento influopovon sur la eminentan personon, kies honoro kaj trankvileco venas en tian hazardon.

— Sed tiu influopovo,— mi intermetis,— dependus de tio, ĉu la ŝtelinto scias, ke la

perdinto scias, kiu estas la ŝtelinto. Kiu homo kuraĝus...

— La ŝtelinto,— diris G—,— estas la Ministro D—, kiu ĉion kuraĝas, egale ĉu ĝi maldecas aŭ decas al homo. La maniero de la ŝtelo estis ne malpli lerteca ol maltima. La dirita dokumento, mi malkaŝe konfesas, ke ĝi estas letero, estis liverita al la persono, kiam ŝi estis sola en la reĝa buduaro. Dum ŝi legis ĝin, subite interrompis ŝin la eniro de la alia eminenta persono, kontraŭ kiu ŝi aparte deziris ĝin kaŝi. Post rapida, vana ekprovo ĝin ŝovi en tirkeston, ŝi devis ĝin meti malfermitan sur tablon. La adreso tamen estis supra, do la enhavo ne montriĝis, kaj la letero restis nerimarkite. En tiu cirkonstanco eniras la Ministro D—. Lia linka okulo tuj rimarkas la paperon, rekonas la manskribon de l' adreso, vidas la konfuziĝon de la adresata personino, sondis ŝian sekreton. Rapidinte laŭ sia ordinara maniero tra kelkaj oficialaj aferoj, li trovas leteron iom similan je tiu, ĝin malfermas, ŝajnigante ĝin legi, kaj ĝin demetas apud la alia. Denove li priparolas publikajn aferojn dum eble dek kvin minutoj. Fine, akceptante la forpermeson, li forprenas de sur la tablo la leteron, pri kiu li havas nenian rajton. Tion vidis la rajta posedanto, sed ne kuraĝis, antaŭ la tria persono staranta ĉe ŝia kubuto, atentigi pri tiu ago. Foriris la ministro, postlasante sur la tablo sian propran leteron, ian malgravaĵon.

— Jen do vi havas,— al mi diris Dupin,— precize tion, kion vi postulas por kompletigi la influopovon, nome, ke la ŝtelinto scias, ke la perdinto scias, kiu estas la ŝtelinto.

— Jes,— respondis la Prefekto:— kaj la povon tiel akiritan oni dum kelkaj lastaj monatoj manovris en politikaj celoj, ĝis grado tre danĝera. La priŝtelita eminentulino ĉiutage pli konvinkigis pri la nepra neceso rehavigi al si sian leteron. Sed tion, kompreneble, oni ne povas fari malkaŝe. Fine, ĝis malespero pelite, ŝi konfidis al mi la aferon.

— Kaj mi supozas,— diris Dupin, meze de vera turnvento da fumo,— ke agenton pli sagacan oni ne povus deziri, nek imagi.

— Vi flatas min,— respondis la Prefekto;— tamen tre povas esti, ke oni eĉ havis tian opinionon.

— Evidente,— mi diris,— kiel vi ankaŭ rimarkigis, la ministro ankoraŭ nun tenas tiun leteron; ĉar estas la tenado de la letero, kiu donas la povon, kaj ne ĝia uzado. Tuj ĉe la uzado, malaperas la povo.

— Ĝuste,— diris G—;— kaj laŭ tiu konvinko mi faris mian procedon. Unue mi zorgis atenteghe traserĉi la domon de la ministro; kaj

tiurilate mia ĉefa malfacilo estis la neceseco fari la serĉadon nesciate de li. Antaŭ ĉio cetera oni min estas avertinta pri la danĝero, kiu povus sekvi, se ni lasus al li suspekti pri nia plano.

— Tamen,— mi diris,— vi estas tute kompetenta por tiaj esploroj. Ofte jam faris tion la Pariza polico.

— Kompreneble; kaj pro tio mi ne senesperigis. La kutimoj de la ministro ankaŭ tre faciligis por mi la taskon. Ofte li forestas de la domo la tutan nokton. Da servantoj li havas malmulte. Ili dormas malproksime de la ĉambro de sia mastro, kaj, ĉar ili estas plejparte Napolianoj, ili estas facile ebriiĝataj. Ŝlosilojn mi havas, kiel vi mem scias, per kiuj mi povas malŝlosi ĉiun ĉambron aŭ meblon en Parizo. Dum tri monatoj ne pasis nokto, kies pli grandan parton mi ne pasigus persone traesplorante la domon de D—. Mia honoro estas koncernata; ankaŭ, sed tion mi diras en profunda sekreto, grandioza rekompenco estas proponita. Tial mi nur tiam forlasis la serĉadon, kiam mi plene konvinkigis, ke la ŝtelinto estas homo pli ruza ol mi. Mi opinias, ke mi traesploris ĉiun plej etan angulon de tiu bieno, en kiu la papero nur povas esti kaŝita.

— Sed ĉu ne estas eble,— mi diris konjekte,— ke, kvankam la letero sendube estas ankoraŭ tenata de la ministro, li eble kaŝis ĝin aliloke, kaj ne en sia domoloko?

— Preskaŭ neeble,— diris Dupin.— La nuna neordinara stato de aferoj ĉe la kortego, kaj aparte de tiuj intrigoj, en kiuj oni scias, ke D— enmiksigis, certe efikas tiel, ke la tuja havebleco de la dokumento, la ebleco ĝin liveri je momenta averto, estas punkto preskaŭ tiel grava, kiel ĝia tenado mem.

— La ebleco ĝin liveri?— mi demandis.

— Alivorte, la ebleco ĝin detrui,— diris Dupin.

— Prave,— mi respondis;— evidente do la papero estas en la domoloko. Ke ĝi estus sur la persono de la ministro, tion ni povas opinii nekonsiderinda.

— Tute,— respondis la Prefekto.— Dufoje jam li estas kaptita, kvazaŭ de banditoj, kaj lian personon oni atente esploris sub mia propra kontrolo.

— Vi povus ŝpari al vi tiun laboron,— diris Dupin.— Kredeble D— ne tute estas malsaĝulo, kaj tial li devis antaŭsupozi tiujn banditaferojn, kiel nepre okazontajn.

— Ne tute malsaĝulo,— diris G—,— tamen poeto li estas, kio, laŭ mi, disigas lin nur per unu grado de malsaĝulo.

— Prave dirite,— diris Dupin, post longa kaj enpensigema fumtiro ĉe la pipo "mar-

ŝaŭma,"—malgraŭ la poeziaĉaj ekprovoj, pri kiuj mi ankaŭ estas kulpa.

—Vi bonvolu rakonti,—mi diris,—la detalojn de via serĉado.

—Efektive, ni agis sen rapideco, kaj ni serĉis ĉie *senescepte*. Longan sperton mi posedas en tiaj aferoj. La tutan konstruaĵon mi ĉambiron post ĉambro atentis, dediĉante al ĉiu tutan semajnon da noktoj. Ni esploris, unue, la meblaron de ĉiu ĉambro. Ni malfermis ĉiun ekzistantan tirkeston; kompreneble vi scias, ke ne povas ekzisti, por kompetenta polic-agento, tirkesto *sekreta*. Sentaŭgulo estas ĉiu homo, kiu en tia serĉado lasas, ke restu kaŝita kontraŭ li ia *sekreta* tirkesto. La afero estas tiel simpla! Ekzistas en ĉia meblo certa kvanto da granda, da spaco, kiun oni severe kontrolas, per la helpo de precizaj mezuriloj. Ne povus eviti nian observon eĉ unu dekono de milimetro. Post la mebloj, ni atentis la seĝojn. La kusenojn ni trasondis per la longaj, delikataj pingloj, kiujn vi vidis min uzi. De la tabloj ni forprenis la suprajn tabulojn.

—Kial do?

—Foje la homo, kiu volas kaŝi ian objekton, deprenas la supron de tablo aŭ de iu meblo simila, boras en la kruron, metas la objekton en la truon, kaj remetas la tabulon. Same oni faras ankaŭ kun la supraj kaj malsupraĵoj finoj de litostangoj.

—Sed, ĉu oni ne povus eltrovi la kavaĵon per sona provo? —mi demandis.

—Tute ne, se oni metas ĉirkaŭ la objekto, ĉe la kaŝado, sufiĉan vaton da kotono. Cetere, ĉe nia koncerno, ni devis procedi sen bruoj.

—Tamen, vi ne povus depreni..., vi ne povus tute malkonstrui ĉiujn meblajn objektojn, en kiun oni povus enŝovi laŭ la dirita maniero. Leteron oni povas premuli en formon de vergeto tre simila, laŭ formo kaj grandeco, je granda trik-kudrilo; kaj en tiu formo oni povus, ekzemple, kaŝi ĝin en transan bastonon de seĝo. Kredeble, vi ne malkonstruis ĉiujn seĝojn?

—Certe, ne; eĉ pli bone ni faris: ni per forta mikroskopo esploris la transaĵojn de ĉiu seĝo en la domo, ankaŭ la kuntuŝojn de la pecoj de ĉiuspecaj mebloj. Se estus signoj iaj de nova dispecigo, nepre ni tuj ilin konstatus. Eĉ unu sola lignereto, lasita de borilo, estus tiel evidenta por ni, kiel pomo. Ĉiu malordo en la kunluado, ĉiu neordinara fendeto ĉe la kuntuŝoj, sufiĉus por denunci.

—Supozeble, vi atentis pri la speguloj, serĉante inter la tabuloj kaj la vitraj platoj, kaj pingle sondis la litajn kusenojn kaj kovrilojn, kiel ankaŭ la kurtenojn kaj tapiŝojn.

—Tion, kompreneble; kaj, trairinte tia-maniere ĉiun pecon de la meblaro, tiam ni traserĉis la domon mem. Ĝian tutan supraĵon ni dividis en fakojn, numeritajn, por eĉ ne unu ellasi; tiam per la mikroskopo ni esploris ĉiun kvadratan centimetron aparte, kiel ankaŭ en la ambaŭflanke starantaj du domoj.

—La du flankajn domojn? —mi ekkriis; —grandegan do klopodadon vi prenis sur vin.

—Jes, efektive; sed grandiozan rekompencon oni proponis.

—Ĉu vi enkalkulas la terpecojn apudajn de la domoj?

—La kortoj estas ĉiuj pavimitaj per kaheloj. Relative nur malgrandan klopodon ili faris al ni. La muskon inter la brikoj ni ekzamenis, kaj trovis ĝin netuŝita.

—Vi serĉis, kompreneble, inter la paperoj de D—, kaj inter la libroj de lia biblioteko?

—Certe; ni malfermis ĉiun pakaĵon kaj paketon; ne sole ni malfermis ĉiun libron, sed de ĉiu volumo ni foliis ĉiun folion, ne kontentigante per nura ekskuo, kiel faradas kelkaj el niaj policanoj. Eĉ ni mezuris la dikecon de ĉiu librokovrilo, kun ekstrema precizeco, kaj ĉiun kovrilon ni plej suspekteme mikroskopis. Se iu el la bindaĵoj estus nove falsita, estus tute neeble, ke tiun fakton ni ne observus. Kvin aŭ ses volumojn, nove venintajn el la manoj de bindisto, ni sondis laŭlarĝe per la pingloj.

—La plankojn sub la tapiŝoj, ĉu vi esploris?

—Eksterdube. Ĉiun tapiŝon ni levis, kaj esploris la tabulojn per la mikroskopo.

—Kaj la tapetaĵon sur la muroj?

—Jes.

—Kaj en la kelojn...?

—Ni esploris.

—Tiam,—mi diris,—vi estas malĝuste konjektinta, kaj la letero ne estas en la bieno, kiel vi supozis.

—Mi timas, ke en tio vi estas prava,—diris la Prefekto.—Kaj nun, Dupin, kion vi konsilas al mi fari?

—Denove traesplori la tutan domlokon.

—Jen kio estas absolute senbezona,—G— respondis.—Ne pli certa mi estas, ke mi spiras, ol ke la letero ne estas en tiu domo.

—Nenian pli bonan konsilon mi povas al vi proponi,—diris Dupin.—Sendube vi havas precizan priskribon de la letero?—

—Ho, jes!—Kaj la Prefekto aperigis notlibron kaj voĉeklegis precizan priskribon de la aspekto, interna kaj precipe ekstera, de la mankanta dokumento. Baldaŭ post la fino de tiu legado, li foriris, spirite pli depremegita, ol mi iam antaŭe rimarkis ĉe tiu bonulo.

(*Daurigota*).

Tri Reĝidoj.

La reĝa palaco brilis per miloj da lumoj. Korteganoj riĉe vestitaj kaj altrangaj oficistoj estis senĉese en movado.

La reĝo festis solene la revenon de siaj filoj, kiuj estis en malproksimaj landoj, por ke ili ellernu tie vivi kaj regi.

Tri jarojn ili estis eksterlande kaj nun ili revenis riĉaj en sciencoj kaj spertoj. Ĉiuj prezentiĝis en la tronsalonego.

Kun luksa sekvantaro eniris la reĝo kaj ordonis al la reĝidoj—kiuj kun respekto staris apud la trono—rakonti, kion ili ellernis eksterlande kaj kia frazo devas esti signaldiro de la monarĥo kaj de la homo.

Unue alpaŝis la plej maljuna filo.

Li estis kuraĝa kiel falko kaj sincera kiel oro.

La reĝido diris per voĉo levita:

— Mallibereco estas malbona, kiu mian koron traigis per teruro. Ĉiu paŝo en tiuj landoj, en kiu mi estis, sonas intertinto de katenoj kaj ĝemoj de katenitaj sklavoj. En tiuj landoj, en kiu mi estis, la homaro fleksiĝas sub pezo de siaj devoj kaj ĝi havas nenian leĝojn. La homoj en tiuj landoj estas sklavoj. Kaj mi diris al mi: Libereco estas bono, kiu donas feliĉon al senhereduloj. Kaj mi ĵuris esti monarĥo de liberaj regnantoj, kiuj havas egalajn leĝojn kaj egalajn devojn. Jes, patro! Libereco estas la plej alta homa bonaĵo; tio estas mia frazo.

En la vico de korteganoj kaj altranguloj oni murmuris. “Libereco?” ili demandis unu la aliajn. “Libereco? Kaj pri ĝi parolas la reĝido, la sekvanto de l’ trono? Ne, ne, ni ne volas al li servi, ĉar ni ne povas garantii prosperon de l’ regno. Libereco bezonas nur malsaĝulojn, kaj prudentaj regatoj kontentiĝas per favoro de la monarĥo.”

La reĝo, aŭdinte kaj vidinte malkontentecon, diris al la plej maljuna reĝido:

— Vi estas kuraĝa kaj nobla, mia filo, sed ne nur en tiuj ĉi konsistas la saĝeco de l’ monarĥo.

Kaj la duan filon alvokis li.

— La saĝecon de scienculoj kaj sciencojn mi deziregis koni. Kaj ĉiuspecaj enigmaj aperoj en la naturo, ĉiaj sekretoj de l’ homa animo malfermiĝis antaŭ mi. Kaj nun mi komprenas la intencojn kaj pensojn de flatuloj kaj mensoguloj, kaj en la scienca mondo estis malkaŝita al mi la tragedio de la homa ekzisto. Laŭte do mi diras: Ekkono de la vero devas esti la torĉo de l’ nacioj!

— Jes, jes! — murmuris la korteganoj — estas vero... Ne ĉiu vero estas bona kaj ne ĉiu scienco estas utila. Estas multaj sciencoj, kiuj nur malhelpas al la homoj esti bonaj

subuloj. La pereiga sofismo kondukas al malobeemo kaj ofte malpacigas la trankvilan funkciadon de la regna vivo.

— Mi ne konsentas kun vi! — diris la reĝo.

Nun li alvokis la plej junan, belegan junulon.

— La amo nur — li diris kun flamanta vizaĝo — devas esti la standardo de la homaro. Nur la amo ekstermas malliberecon kaj donas komprenon de vero. Mi vidis, kiel la amo detenas la manon de krimulo kaj devigas plori la ekzekutiston. Amo faras justaj la monarĥojn kaj pravaj la subulojn.

La korteganoj alŝoviĝis proksimen al la trono kaj kun rideto aŭskultis la junulon.

— Kia idealisto estas li — ili diris. — Tiu ĉi estos mirinda kaj bona monarĥo. Kun li facile estos labori por la bono de nia patrujo!

Kaj la titolon de tronsekvanto donis la reĝo al la plej juna filo.

El la pola lingvo tradukis

SALOMON KORNFIELD.

El Juna Esperantisto.



El Hindujo.

Mi unu fojon fervojiris nokte trans la ebenajon de Gango de norda Hindujo. Ĉirkaŭ la nokto-mezo mi salte vekiĝis, por trovi, ke la vagonaro staras, dum tra malfermitaj fenestroj envenas al mi sono de multaj voĉoj kune kun ŝovado de piedoj. Elrigardante, mi vidis, kiom eble en stelpena mallumo, nur liberan vastan kampon sen domo nek alia homkonstruaĵo videbla. Mi vokis al mi apudvagantan vilaĝanon kaj demandis al li, kio okazis. “Porko kuŝas sur reloj, *sahib*,” li rediris, kaj forturnis sin, kvazaŭ ĉio jam klariĝos por mi. Dubante, ĉu mi bone aŭdis la dialekteman kamparanon, mi haltigis nun la konduktoron de l’ vagonaro, kiam li preterpasis min, kurante al la lokomotivo. “Kio estas?” mi alparolis lin. “Ho, *sahib*,” li senspire respondis, “iu malbenita porko dormas sur la reloj!” “Sed kial diable vi ne forpelas ĝin?” “Ho, *sahib*, ni malfeliĉe ne havas *mehtar* [senkasta kotisto] kun ni. Ni devos venigi unu el la plej proksima vilaĝo.” Mi ekkomprenis. La hinda religio malpermesas mortigon de kio ajn. Tial oni haltigis la ne tro rapide kursantan vagonaron. Poste, nenia kashava Hindu povis makuli sin, alproksimiĝante al tiel malpura besto, kiel porko. Ni sekve atendis dudek plenajn minutojn sur la noktomeza kampo, ĝis oni sendis al najbara vilaĝo vekita kotiston, kiu, veninte, faris al lia porka moŝto unu piedbaton kaj rulis lin, blekegantane, en apudvojan kavon. Fine, la konduktoro kriis, “Ĉio en ordo!” la veturantoj reeniris siajn vagonojn, la lokomotivo longe fajfis, kaj ni ekiris denove.—HERBERT M. SCOTT, *Usono.*

La Fratino de Joĉjo.

Rakonteto originale verkita Esperante de JOHN TAYLOR.

“Kien vi intencas iri en via libertempo, Vilĉjo?”

“Mi tute ne scias,” mi respondis. “Enuigas min la marbordaj urboj kaj mi ne deziras gastu en la domo de mia onklo tial, ke ni ĉiam malpacigas.”

“Vi do gastu en nia domo, kara!” ekkriis Joĉjo. “Ni loĝas apud la marbordo sed ne proksime de ia urbo. Troviĝas nur la patrino kaj mi —,” li paŭzis momenton kaj daŭrigis, “kaj la fratino, kompreneble.” Mi rimarkas, ke la fratoj ofte forgesas pri la ekzisto mem de siaj fratinoj.

Mi ŝanceliĝis. Joĉjo estis mia plej kara amiko kaj tre alloga estis la invito, sed — li havis fratinojn! Tion mi antaŭe nesciis, sed la fakto jam fariĝis nedubebla. Kiel tio estis grava, vi demandas. Nu, mi devas sciigi al vi, ke antaŭ longatempe mi aliĝis al iu klubo, kies ĉefa celo estis malestimi la edziĝon, la amindumadon kaj entute la virinan sekson mem. Plie, mi estis prezidanto de tiu klubo kaj le plej arda probatalanto pro la afero. Neniam mi alparolis al virino, se tion mi povus eviti kaj kiam ajn mi preterpasis knabinon sur la strato mi zorge deturnis mian rigardon. Tial mi havis dubon pri la ebleco loĝi en iu domo, kie mi devos ĉiutage renkonti mian malamikon (aŭ prefere, malamikinon) vizaĝon kontraŭ vizaĝo.

Mi ne kuraĝis demandi al Joĉjo pri la aĝo, aspekto, k.c., de lia fratino, ĉar mi timis, ke li ne moku min. Fine mi cedis al lia peto kaj konsentis veni la morgaŭon al lia domo. En ĉiu okazo mi kredis, ke mi estas plene armita kontraŭ la allogaĵoj de Venuso mem.

La patrino de Joĉjo afable bonvenigis min kaj mi baldaŭ estis kvazaŭ hejme. Kvankam mi iom timeme ĉirkaŭrigardis enirante la manĝoĉambron por vespermanĝi, nenie estis videbla la danĝera estaĵo. “Kie estas Rozinjo, patrino mia?” demandis Joĉjo. “Ŝi eliris antaŭ du horoj por serĉi mi ne scias kian specon de floro kaj ŝi diris, ke eble ŝi revenos iom malfrue,” estis la respondo. Mi spiris pli libere. Ju pli malfrue, des pli bone. Sed apenaŭ la patrino eldiris la lastan vorton, malfermiĝis la pordo kaj dolĉa — jes, mi ne povas ĝin nomi alie — dolĉa voĉo aŭdiĝis: “Panjo, mi trovis tutajn amasojn da tiuj floroj. Rigardu kiel belaj —.” La voĉo subite silentiĝis, ĉar la posedanto jam rimarkis, ke ĉeestas nekonatulo ĉe la tablo.

Mi turnis la kapon por rigardi la parolinton. Gracia knabino havanta dek ok jarojn, staris sur la sojlo. Ŝi estis blanke vestita kaj portis

en ĉiu mano grandan bukedon da helkoloraj floroj. Sed la vizaĝeto, kiu elrigardis el sub la larĝanda ĉapelo duone petole duone konfuzite, estis la plej bela floro el ĉiuj. Nu, kial vi ridetaĉas? Se estas permesate al mi admiri floron, mi supozas, ke estas same permesate admiri belan vizaĝon. Oni ja povas admiri kaj — nenion plu.

Joĉjo leviĝis. “Fratinetu, jen estas mia amiko, pri kiu mi tiel ofte paroladis. Vilĉjo, mi prezentas al vi mian petoleman fratinojn, Rozinjo, kiun neniu ankoraŭ povas malsovaĝigi.”

“Dankon pro viaj komplimentoj,” respondis la fratino de Joĉjo, ridante kaj samtempe ruĝiĝante, “sed se mi efektive fariĝis sovaĝa besto, tio okazis kaŭze de via ĉiama incitado.”

La vespermanĝo estis multe pli gaja post kiam alvenis la fratino de Joĉjo. Mi ne scias la kialon, sed neniam ankoraŭ mi estis en tia bona humoro. Kompreneble, estas malfacile malhelpi, ke oni kelkfoje ne rigardu al homo, kiu sidas ĉe la kontraŭa flanko de la tablo kaj estus terure malĝentile ne paroli al la filino de via gastigantino. Tial estas tute nenecese, ke vi faru tian grimacon, ho leganto. Tamen, kuŝiĝante tiunokte, mi serioze pripensis, ke ne tro multe plaĉus al mi, se la anoj de la klubo vidus mian konduton ĉe la manĝotablo kaj ke en la estonteco mi devas agi iom pli singarde.

Tre agrable mi pasigis la du sekvantajn semajnojn. Joĉjo kaj mi fiŝkaptadis, ŝipveturadis, naĝadis, ludadis laŭtenison. Ofte akompanadis nin la fratino de Joĉjo. Oni ne povis ĉiame lasi ŝin en la domo; tion vi facile komprenas. Kelkfoje ŝi piediradis al la plej proksima urbo por aĉeti necesojn por la mastrumado. Pli kaj pli ofte mi akompanadis ŝin. Ne decas, ke juna knabino portu pezajn pakajojn. Cetero ŝi estis inteligenta, kvankam iom malseriozema. Tamen ni interparoladis nur pri plej ordinaraĵoj, kaj tio malutilas al neniu.

Fine alvenis la antaŭlasta tago de mia libertempo. Joĉjo eliris frumatene pro ia afero, kiu urĝis. Matenmanĝinte mi promenadis en la ĝardeno. Mi pripensis gravan demandon, pri kiu mi ne povis decidiĝi. Mi ne intencas sciigi al vi tion, kio ĝi estis; ĝi neniel koncernas vin kaj vi ŝajne estas mokemulo. Subite mi ekaŭdis malpezan paŝadon malantaŭe de mi. La voĉo de la fratino de Joĉjo sonis en miaj oreloj: “Ĉu vi volas viziti la marbordon hodiaŭ matene aŭ ne, sinjoro?” Mi rigardis al la gaja, bela vizaĝeto. Morgaŭ mi foriros kaj la klubo bonvenigos sian prezidanton. Nenion mi riskos,

promenante kelkajn horojn kune kun la fratino de mia amiko. Kaj la maraero estas tre refreŝiga. Tial ni iris kune.

La mateno pasis rapide — kaj feliĉe. Ni vagadis laŭlonge de la marbordo, serĉante diversajn specojn de algoj, kaptante multajn strangformajn konkojn, interparolante, ŝercante. Subite ŝi ektiris mian manikon kaj montris per la fingro al la maro. "Rigardu!" ŝi ekkriis per timema voĉo. "La marfluo!"

Antaŭ plena horo ni estis enirintaj malgrandan golfeton kaj lacigitaj de nia vagado estis sidiĝintaj por ripozi. Tro longe ni estis restintaj tie. Ĉe la unua ekvido, mi eksciis, ke nun ni ne povas forkuri. La alproksimiĝantaj ondoj jam fermis por ni la elirejon ambaŭflanke. Kaj plimalpli baldaŭ la marfluo kovros la tutan sablaĵon. Kion ni faros? Mi ne deziris droniĝi kaj — la fratino de Joĉjo ankaŭ estis en danĝero.

Mi turnis mian rigardon al la bordkrutaĵo. Ĝi similis al treege alta kaj glata muro. Mi ekmalesperis, sed la fratino de Joĉjo estis sprita junulino. "Ie sur la krutaĵo troviĝas speco de vojeto, supren kondukanta al kaveto, kiun neniam atingas la marfluo. Ni serĉu ĝin tuj."

Nur ĝustatempe ni trovis la tielnomitan vojeton. Plejparte ĝi konsistis el boritaj en la ŝtonegon truoj, per kiuj oni povis penege grimpi. Kiam ni komencis supreniri, la ondoj jam lavis la malsupron de la krutaĵo. La grimpadado estis malfacila, sed mi helpis la fratinton de Joĉjo kiom eble. Foje ŝi preskaŭ falis, sed mia brako savis ŝin. Ŝi dankis min per rapida ekrigardo de la bluaj okuloj. Mia koro batis pli rapide — kredeble pro ekscitiĝo.

Fine ni atingis la kaveton. Ĝia formo similis al kruda seĝo, sed troviĝis sidloko nur por unu persono. Nova embaraso, tamen la solvo estis sufiĉe facila. "Mi sidiĝos sur ĝin kaj vi sidos sur miaj genuoj, fraŭlino," mi diris, "se tio ne malplaĉos al vi." La fratino de Joĉjo ŝajnis ŝanceliĝi momenton, poste ŝi ridetis. "Mi supozas, ke tio estas deviga laŭ la cirkonstancoj. Sed estos por vi tre malagrabla."

Ĉu efektive? Mi ne estis tiel certa, kiel ŝi, pri tio. Rigardante la belajn trajtojn tiel proksime de mi, ŝajnis, ke mi havas ian strangan senton de plezuro. Blovataj de la vento, ŝiaj bukloj flirtis antaŭ miaj okuloj. Miaopinie, buklaĵoj, kiuj estas samtempe orkoloraj, estas iom allogaj.

"Ĉi tiu regiono estas tre senhoma," ŝi murmuretis. "Eble ni devos resti ĉi tie unu-du horojn, antaŭ ol iu rimarkos nin."

Estas strange, ke mi tute ne deziris tro fruan saviĝon. Fakte, mi komencis ĝui la situacion. Estas agrable tiam, kiam bela knabino sidas sur viaj genuoj. Se vi ne volus kredi al mi, vi mem provu la aferon. Mi atente observis ŝian

duone deturnitan vizaĝon. Mi rimarkis la malgrandan, rektan nazon, la molajn, rozkolorajn vangojn, la konkosimilan oreleton. Mi tre deziris vidi la okulojn, kiuj estis mallevitaj.

"Fraŭlino," mi diris, "ĉu vi estas timigita?" Tiu ĉi ruzo efikis. Ŝi turnis al mi sian vizaĝon. "Vere ne," ŝi respondis mallaŭte, "tiel longe kiel vi ne forlasas min." La belaj, bluaj okuloj rigardantaj al mi tiel konfideme, tute ensorĉis min. Forlasi ŝin? Certe ne! Cetere, kiel tio estus ebla? Kaj tion mi klarigis al ŝi.

La marfluo ankoraŭ leviĝadis. Ni silente observis la ondojn, kiuj de tempo al tempo frapadis sur la ŝtonegon kaj disĵetadis ŝaumajn nebulojn. Iu ondo pli granda ol ordinare bruege ĵetis kolonon da ŝaŭmo alte super niajn kapojn kaj ŝi ektremis, eligante krieton pro timo. Mi ĉirkaŭprenis ŝian talion kaj tenis ŝin firme. La minacanta grandegulo reiris kaj ni spiris pli libere. Sed mi ne ĉesis ĉirkaŭpreni ŝin, timante novan danĝeron. "Estas neniel necese nun min teni tiel preme," ŝi diris iom ruĝiĝante.

Ial mi ne volis liberigi ŝin. Ŝajnis al mi, ke troviĝas nenio pli dezirinda ol la ĉiama ĉirkaŭprenado — tio estas, se la ĉirkaŭprenato estus la fratino de Joĉjo. Kia ideo ĉe viro, kiu kutimas malestimi la tutan virinaron!

Tamen kiu povus malestimi tian ĉarmulinon? Kvankam ŝia vestaĵo estis tramalsekiĝita per la akvo kaj disŝirita per la penega grimpadado, kvankam ŝia ĉapelo forestis kaj ŝiaj haroj estis malligitaj, la fratino de Joĉjo ankoraŭ estis rava. Mi tute perdis la sinregadon; tion mi volonte konfesas. Mi forgesis la klubon, la regulojn laŭ kiuj ĝis nun mi ordigis mian vivon, ĉion krom tio, ke mi tute, nereveniĝebla, freneze enamiĝis en la fratinton de Joĉjo. "Rozinjo!" mi murmuretis. Ŝi ektremis ĉe la sono de mia voĉo kaj la bluaj okuloj mire ekrigardis min. "Rozinjo!" mi ripetis. "Antaŭ ne longe vi diris, ke vi ne volas, ke mi forlasu vin."

"Jes, tion mi ja diris," ŝi respondis, pli mirigita ol antaŭe. "Vi certe ne intencas forlasi min nun?"

"Nek nun, nek en la estonteco, Rozinjo mia," mi kriis, "se nur vi povus ami min." Poste, ekvidante, ke ŝi nenion rediras, mi daŭrigis: "Ĉu tio estas iel esperebla, karulino?"

La fratino de Joĉjo dolĉe apogis la kapon sur mian bruston kaj kaŝante la ruĝiĝintan vizaĝeton en la faldo de mia vesto, murmuretis per voĉo apenaŭ aŭdebla: "Jes, Vilĉjo, ĉar de longe mi tion faris."

Aŭdiĝis malproksime kriego kaj ni sciis, ke ni estas savotaj. Sed tio estis malgranda afero kompare kun la pli grava scio, kiun ni ĵus konstatis.

Ĉio tio okazis antaŭ kelkaj jaroj. Mi estas edzigitaj kaj la klubo estas de longe nuligita. Mia edzino ofte diras, ke mi neniam estis taŭga por la ofico de prezidanto. Kaj sendube ŝi estas prava. Ĉar mia edzino ĉiam estas prava. Se iu persono kuraĝus nei tion, mi faligus lin per pugnobato.

P.S.—Mi tute forgesis sciigi al vi, ke mia edzino estas ankaŭ la fratino de Joĉjo.



I.—Ĥejri, Gurkur kaj Bubalo.

EL HUMORAĴAJ RAKONTOJ DE RODA RODA.

Unu fojon Ĥalifo faris juĝon en Bagdado. Antaŭ lia trono aperis neordinaraj plendistoj: la kamelo—Ĥejri, la azeno—Gurkur, kaj la bovo—Bubalo. Ĥejri alparolis je la nomo de ĉiuj tri:

— Nobla Ĥalifo! — li komencis, — vazo kaj ujo de justeco! Grizbarba fonto de lumo! Beleco de l' trono! Sceptro de popola konfido! Ni, ĉiuj triope—mi, Ĥejri, Gurkur kaj Bubalo, aperis antaŭ via afabla vizaĝo alporti plendon je homoj, kiuj malhonoras nin, bestojn kaj ŝanĝis niajn honestajn gentajn nomojn en reciprokan insulton kaj mallaŭdon. Se homo faris malsaĝon, aliaj homoj diras al li "ho, vi kamelo, azeno, bovidaĵo!" Saĝa Ĥalifo! Malpermesu al homoj malbonuzi niajn nomojn.

La Ĥalifo longe konsideris kaj fine diris:

— Via plendo, videble, ne estas senbaza, kaj tamen al via malfeliĉo estas malfacile helpi; tiu ĉi kutimo jam tre forte inokuligis; ĝi ne elradikiĝos per malpermeso. Homoj tro kutimis opinii vin malsaĝaj. Mi tamen provos. Iru—vi, Ĥejro—al oriento, vi, Gurkuro—al sudo—vi, Bubalo—al okcidento kaj serĉu, ĉu trovos sin homo, kiu estos pli malsaĝa ol unu el vi. Post unu semajno vi revenu kaj komuniku al mi rezultatojn de viaj migroj. Tiam mi decidus, kiel oni devos agi en la estonta tempo.

Pasis unu semajno, kaj ili triope ree aperis antaŭ la Ĥalifo komuniki kion ili trovis.

Unua parolis Bubalo:

— En la urbo Arbelo mi estis atestanto de juĝo kontraŭ juna Abdulo. Oni kulpigis lin je ŝtelo de saketo, en kiu estis oro de unu Armeniano Gigozo.

Oni arestis lin kaj trovis ĉe li multe da oro, kvankam Abdulo devenis el malriĉa familio.

Abdulo, plorante, kredigis, ke li estas senkulpa kaj ke li en tiu ĉi tempo estis ne en la butikoj, sed hejme kune kun sia patrino.

— Se tio ĉi estas vere, — diris Kadjo de Arlo, — alvoku lian patrinon, mi demandos ŝin: mi

konas ŝin; ŝi estas pia kaj honesta virino, ŝi ne mensogos.

Kaj li ordonis alvenigi Abdulan patrinon.

— Diru, nobla Ĥalifo, ĉu tiuj ĉi homoj ne estas pli malsaĝaj ol bovoj; ili imagas, ke patrino ne estas kapabla fari jurkrimon por utilo de sia infano?

— Vi ĝajnis vian aferon, — diris la Ĥalifo, — nun ni aŭskultos Gurkuron.

— Kaj mi, kaj mi! — ekkriegis la azeno, — mi, videble, ankaŭ solvis mian temon. Kurante sur la stratoj de l' urbo Gangamelo mi vidis ribelistojn, sieĝintajn la domon de l' urbestro. Ili kaptis lin kaj faris juĝon, kulpigante lin je profiteco kaj hipokriteco. Poste ili forbruligis lin sur lignaro kaj anstataŭ li elektis novan urbestron Omeron-ibu-Selimon.

Nova urbestro Omero promesis al ili regi honeste kaj konsciencie, zorgante nur pri komuna bono. Ili, aŭdinte tion ĉi, ĝojis kaj ĝajis, ke nun ĉe ili estas urbestro pli bona ol la antaŭa.

— Diru, saĝa Ĥalifo, ĉu homoj ne estas pli malsaĝaj ol azenoj? Ili kredis, ke homo havanta potencon zorgos pri komuna bono kaj ne pri sia propra.

La Ĥalifo enpense ekbalancis la kapon je l' signo de konsento kaj ordonis paroli al la kamelo—Ĥejro.

— Mi paŝtigis, — rakontis Ĥejro, — sur herbeto. Preter mi sur la vojo iris: fraŭlino kaj viro. Li certigis ŝin pri io, sed ŝi nur balancis la kapon. Tiam la viro diris:

— Mi amas vin; mi ĵuras, ke mi amas vin!

Sed ŝi ne volis aŭdi, parolante, ke li estas nekonstanta kaj ke li morgaŭ forgesos ŝin.

— Neniam, mia kara, mia adorata, — li ekkriis, — mi ĵuras, ke mi amos vin eterne, tiel varmege, kiel nun!

Aŭskultante tion ĉi, la juna fraŭlino alpremis sin al lia brusto, kaj ili komencis sin kisi.

— Diru, nobla Ĥalifo, ĉu la homo, ĵuranta je l' eterna amo, ne estas pli malsaĝa, ol kamelo? Kaj ŝi, kiu kredis al li?...

— Sufiĉe! — interrompis la Ĥalifo. — Vi, ĉiuj tri sufiĉe argumentis vian pravecon.

— Mi ĵuras je l' mia barbo, ke mi permesos al neniu bonreligia muzulmano nomi homon pro lia malsaĝo "kamelo," "bovo," kaj "azeno." Vi povas foriri.

Ili tri eliris. Apud la pordego la kamelo diris:

— Ĉu vi volas veti, miaj fratoj, ke el nia afero estos nenio? Tiu ĉi maljuna azeno imagas, ke iu obeos lian malpermeson.

Tradukis P. MATUSEWICZ.

El Pola Esperantisto.

Pluvo.

Pluvas kaj pluvas kaj pluvas kaj pluvas
 Senĉese, senfine, senhalte,
 El ĉiel' al la ter', el ĉiel' al la ter'
 Are gutoj frapiĝas resalte.

Tra la sonoj de l' pluvo al mia orelo
 Murmurado penetras mistera,
 Mi revante auskultas, mi volus kompreni,
 Kion diras la voĉo aera.

Kvazaŭ ia sopir' en la voĉo kaŝiĝas
 Kaj aŭdiĝas en ĝi rememoro...
 Kaj per sento plej stranga, malĝoja kaj ĝoja,
 En mi batas konfuze la koro.

Cu la nuboj pasintaj, jam ofte viditaj,
 Rememore en mi reviviĝis,
 Aŭ mi revas pri l' sun', kiu baldaŭ aperos,
 Kvankam ĝi en la nuboj kaŝiĝis?

Mi ne volas esplori la senton misteran,
 Mi nur revas, mi ĝuas, mi spiras;
 Ion freŝan mi sentas, la freŝo min logas,
 Al la freŝo la koro min tiras.

L. L. ZAMENHOF.
 El *Tutmonda Espero*, 1909.

**The Vocabulary of Esperanto.**

Translated from the French of Drs. L. COUTURAT and L. LEAU in their work "Histoire de la Langue Universelle," Paris, 1903, p. 319.

Dr. Zamenhof has taken great pains to reduce the vocabulary to a small number of radicals, by means of a regular method of word-formation. And these radicals have been chosen upon the principle of internationality, in order to reduce to a minimum the number of those words which any given nation would find unfamiliar, and would therefore have to learn. The *Universala Vortaro* contains 2,642 radicals, translated into French, English, German, Russian, and Polish, thus showing at a glance the degree of internationality which each word has in relation to these five languages. They can be divided into three classes.

First, there are the radicals, which are entirely international (in the European languages); these *Esperanto* adopts, assigning to them a phonetic orthography as far as possible in keeping with their etymology. Examples: *atom'*, *aksiom'*, *bark'*, *danc'*, *form'*, *flut'*, *fosfor'*, *panter'*, *paralaz'*, *poŝt'*, *teatr'*, *tabak'*, *tualet'*, *vagon'*.

This class of words comprises most of the scientific terms (taken from the Greek or Latin) which the *Universala Vortaro* does not even mention, such as: *filologio*, *filozofio*, *fiziko*, *poezio*, *poeto*, *profesoro*, *doktoro*, *komedio*, *literaturo*, *tragedio*, *telegrafo*, *lokomotivo*, etc.

A second class comprises the radicals which

are partly international; for each idea Dr. Zamenhof has chosen the radical which is most international, in other words, that which is common to the greatest number of European languages. Here are some examples of these, with the indication of their internationality: *flam'*, *marŝ'*, *mas'* (G, E, F, I, R, S); *ankr'* (G, E, F, I, R); *benk'* (G, E, F, I, S); *marmor'* (G, F, I, R, S); *flor'* (E, F, I, S); *jun'*, *artiŝok'*, *fason'* (G, E, F, R); *anonc'* (G, E, F, I); *mus'* (G, E, I, R); *fam'* (E, I, S); *flag'*, *ŝtal'* (G, E, R); *emajl'*, *mebl'*, *trotuar'* (G, F, R); *man'* (F, I, S); *mon'* (E, F); *bind'*, *blind'*, *dank'*, *fajr'*, *fiŝ'*, *fngr'*, *glas'*, *help'*, *jar'*, *land'*, *melk'*, *rajt'*, *ring'*, *send'*, *ŝip'*, *ŝu'*, *sun'*, *trink'*, *varm'*, *verk'*, *vort'* (G, E).

The third class comprises the radicals, which are not international at all. For these Dr. Zamenhof has borrowed radicals from the principal national languages, or from the Latin, according as one or other of these national radicals has the best chance of being known by educated men. He has also here taken the opportunity to increase the participation of Germanic and Slavonic radicals, since, in the two preceding classes, the Latin roots preponderate by reason of their greater internationality. For example, he has borrowed from Latin a certain number of particles (*sed*, *tamen*, *apud*, *dum*) and of radicals such as *aŭd'*, *brak'*, *dors'*, *dekstr'*, *feliĉ'*, *proksim'*; from the Germanic languages the radicals *bedaŭr'*, *bird'*, *fraŭl'*, *flug'*, *flik'*, *knab'*, *kugl'*, *ŝajn'*, *silk'*, *ŝirm'*, *ŝink'*, *ŝraŭb'*, *ŝut'*, *taŭg'*, *vip'*; from Slavonic* languages the radicals *bulk'*, *brov'*, *prav'*, *ŝelk'*, *svat'*, *vost'*. He has thus tried to favour impartially all the European languages, and to make them all compete in the framing of his vocabulary, in order to make his language truly international and as easy as possible for every people of European civilisation. Such a vocabulary, says M. de Beaufront, is not the arbitrary work of an individual, but in a way the collective work of the peoples of Europe, who have unconsciously contributed to its formation by conferring on such or such a word the internationality which it possesses, and of which *Esperanto* merely takes advantage.—A.E.W.

* Radical *bulk'* has its cognate forms in the French *boulangier*, *boule*, Spanish *bollo*, Portuguese *bolo*, English *ball*, all of which are related to Latin *bulla*. *Brov'* has its counterparts in Anglo-Saxon, Dutch, Icelandic, German, its cognate forms in Greek and Persian and in the Sanskrit *bhrū*. *Prav'*, by a curious philological coincidence, obtains from its Russian source almost the direct opposite of the idea contained in the similar Latin form familiar to us in the word *depravity*.—[Note by translator.]

The British Esperanto Association (Inc.).

CANDIDATES FOR MEMBERSHIP.

EXTRACT FROM RULES.—“If no objection shall be lodged within fourteen days, the Secretary shall inform the candidate that he is admitted as a member.”

S. C. AYLWARD, 41, Shakleton-road, Coventry; W. BATH, “Stonyheath,” Orpington; Rev. C. M. BAYLISS, Ashlet Home School, Ottershaw, Surrey; Mrs. COLLINS, 1, Wellington-terrace, Hastings; Miss ALICIA EVANS, 11, Gore Park-road, Eastbourne; LESLIE ROBINSON, 1, Station-road, Balham, S.W.; F. RICKETT SHELTON, 21, King’s-avenue, Muswell Hill, N.

PASSED ADVANCED EXAMINATION.

JAMES G. SIMS, Brighton; ALBERT J. MACDONALD, Brunswick, Victoria, Australia; *Wm. AITKEN, Edinburgh; A. SHERM, Perth, W. Australia; BERTRAM POTTIS, Wellington, New Zealand; CHARLES W. BALLARD, Melbourne, Australia; CLAUDE J. FOWLER, Melbourne, Australia.

* Denotes that the candidate has passed with distinction.



NEW MEMBERS FOR THE NEW YEAR.

There are very many readers of “The British Esperantist” who are not at present Members of the Association.

A New Year will soon be upon us, and, therefore, all who are able to join are invited to do so at once.

In this critical time of European War Esperantists should bear in mind how essential it is to unite for the furtherance of our Cause and the support of our Association.

On the Continent our “samideanoj” are more severely shaken than we by the shock of the war, but we may be sure that when they emerge from the struggle nothing will be more encouraging and stimulating to them than the evidence of a strong movement in this more happy land. Therefore we think that, for the general advantage of the Cause, our Association should see a great increase in Membership during the year 1915. We await with confidence the response of our many well-wishers, recommending to their immediate notice the special form printed on page vi. of this number.



Nomination of Councillors, 1915-16.

The Members and Fellows of the Association are reminded that they have the right to nominate candidates for election as Officers and Council for the ensuing year.

Members and Fellows who desire to avail themselves of this privilege may obtain Forms of Nomination, with the necessary Instructions, from the Secretary of the Association.

The latest date for the receipt of nominations is 18th January, 1915.

H. CLEGG, Secretary.



Guarantee Fund, 1914 (Final List).

Acknowledged in August B. E.	£5.030
J. A. Gill, Tunbridge Wells	20
Total	£5.050



Fako de Korespondado Internacia (F.K.I.).

Sub tiu ĉi rubriko oni enpresas malgrandajn anoncojn de tiuj el niaj legantoj, kiuj deziras korespondadi kun alilanduloj. Ĉiu anoncanto devas pagi ses pencojn (25 spesdekojn) por trilinea enpresaĵo kiel sube (pli ol tri linio. po tri pencoj por ĉia komencita linio); ĉiu MEMBRO de la Asocio havas la rajton fari unu enpresaĵon senpagej Bonvolu skribi legeble, rekte al la Redakcio.

555. Burnley (Anglujo).—S-ro Ben. Booth, 10, Paulhan-street, komencinto, deziras korespondi kun pli progresinta samideano alilanda.
556. Bobrujsk (Minsk. gub.), Rusujo.—S-ro B. Folčinskij, Puškinskaja ul., dez. korespondi per ilustr. p.k.

Council Meeting, B.E.A.

Held at the Offices of the Association on Monday, November 16, 1914, at 6.30 p.m. Present: Messrs. J. Bredall, B. Chatterton, H. A. Epstein, C. A. Fairman, R. Holder, A. Honeysett, B. E. Long, A. Morrow, W. Phillimore, F. M. Sexton, S. H. Taylor, Misses M. L. Blake, C. M. Holmes, E. A. Lawrence, E. O'Brien, A. Schafer. In Attendance: Mr. E. A. Millidge, Mr. A. E. Wackrill, The Secretary.

Esperanto Red Cross Ambulance.—The suggestion of Mr. Merchant (printed in the November BRITISH ESPERANTIST) was submitted for adoption by the Council, and after full discussion the following resolution, proposed by Miss Lawrence and seconded by Miss Schafer, was carried:—

“That Mr. Merchant’s proposal be adopted, and that a Fund be established for purchasing a Motor Ambulance (costing about £400) or a Motor Coffee Stall (costing about £650), the latter, according to the Red Cross Society, being the more urgently needed.”

The arrangements in connection with the Fund were left in the hands of the Hon. Treasurer and the Secretary.

United Effort.—The scheme of help suggested by the Montrose Esperanto Society, and printed in the November BRITISH ESPERANTIST, was formally approved.

Mr. Epstein made an appeal on behalf of returning wounded soldiers for warm clothing.

Classes for Soldiers.—Miss Blake reported that she had successfully introduced Esperanto into a recreation room for soldier recruits. In view of this result, it was decided to write the Y.M.C.A. for permission to hold classes at the recreation camps under their control, and to insert a notice in THE BRITISH ESPERANTIST asking the groups to co-operate in this in their own districts.



Donations to General Funds.

Miss Kammerer, London.....	£1 0 0
Miss J. Wynter, London	0 1 0
Sir J. D. McClure, LL.D.	1 1 0
Brighton and Hove Esperanto Group.....	0 10 0
	<hr/>
	£2 12 0



The Examinations Committee begs to announce that on Monday, December 14, at the offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C., will be held an Examination for the Preliminary Certificate, at 7 p.m., and on Tuesday, December 15, an Examination for the Advanced Certificate, at 6.30 p.m. Candidates should intimate as soon as possible their intention to be present.



Council and Executive Meetings, B.E.A.

Notice is hereby given that the next meeting of the Council will be held on Monday, December 21st, at the Offices of the Association, 17, Hart-street, London, W.C., at 6.30 p.m.

A Meeting of the Executive Committee will follow the Council Meeting.

H. CLEGG, Secretary.

557. Enfield (Anglujo).—S-ro A. J. Farley, komencinto, 112, Nag’s Head-rd., Ponders End, deziras korespondi kun pli progresinta samideano.